# EKO 2023

Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

**EKO 2023 / 26. Majo 5, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Pezo: 1.2 MB. Provu optimumigi la hungaran tapiŝon**

## Ne CEDU, ne cedu!

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la 45-a Esperantologia Konferenco de CED, sub la aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). La aranĝo estos hibrida, ebligante partoprenon rete kaj ĉeeste, kadre de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italio (29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto. 2023).

Du tri-horaj sesioj enhavos plurajn dudek-minutajn referaĵojn elektitajn el inter la ricevita proponoj, kun fina ronda tablo pri la nunaj esploraj defioj de Esperantologio rilate al fontoj kaj arkivoj. Ni bonvenigas proponojn de Esperanto-rilataj studobjektoj en fakoj kiel lingvistiko, historio, sociologio, antropologio kaj literaturaj studoj; ankaŭ interfakaj proponoj bonvenas. Aparte bonvenaj estos proponoj kiuj analizas aspektojn de Esperanto, esperantologio kaj interlingvistiko en Italio, honore al la lando kiu gastigas la ĉi-jaran konferencon. Surbaze de la prezentaĵoj, kelkaj elektitaj tekstoj, redaktitaj de la aŭtoroj por publikigo, aperos en la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies.* **Ni invitas ĉiujn fakulojn - aparte junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn - sendi proponojn** pri referaĵoj. La proponoj, enhavantaj inter 150 kaj 200 vortojn, devas esti senditaj al la retadresoj de la organizantoj: jalcaldevi [ĉe] uoc.edu kaj mtfettes [ĉe] sfu.ca. Proponantoj indiku, ĉu ili intencas prezenti ĉeeste aŭ virtuale.

La limdato por proponoj estas la **15-a de majo 2023**. Por kontroli la programon de antaŭaj konferencoj, vizitu la retejon de CED.

Javier Alcalde, Guilherme Fians kaj Mark Fettes,

## UN-bulteno raportadas

### Numero 63 – marto – aprilo 2023

- UEA markis la Tagon de la Gepatra Lingvo per tutmonda festado.

- Oficialaj pilkoj por la Monda Pokalo en Kataro liveris sian mesaĝon en Esperanto.
- Daŭripovo kaj migrado estos la temoj de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto.
- En konsulta sesio de EKOSOK, UEA substrekis lingvajn demandojn.
- El la hungara al la malta, pere de Esperanto.
- Afrika Komisiono de UEA renkontiĝis en Senegalo.
- La Esperanto-movado funebras respektatan figuron: Andrea Chiti-Batelli.
- Universala Esperanto-Asocio salutis la Tagon de Virinoj.
- Je Edukada Tago 2023, UEA substrekis aliron al edukado kaj multlingvismo.

# Sumoo superis milionon

Tiu ĉi marta sumoo estas memorinda, ĉar ĝi estis la 80-a sumoo kaj la legitaj paĝoj ekde la komenciĝo de la sumoo superis **unu milionon** da paĝoj. Tio signifas, ke la sumoo-istoj legis en tiuj 14 jaroj pli ol **10 000 librojn** kun 100 paĝoj. Kiel estis ĝojaj tiuj libroj ĉefe kuŝantaj en bretoj kaj kiel ĝojaj estis aŭtoroj, eldonistoj kaj libroservoj!




# Murtapiŝo el Hungario

Jen kudrita murtapiŝo el la heredaĵo de s-ro József Csáki (Eger, Hungario).

http://verdastelo.taviroda.com/esperanto-murtapiso/

Barta Zoltán

# ILEI kaj universitatoj

ILEI, laŭ mi. respondecas pri instruado de Esperanto de la infanvartejo ĝis la universitato. aparte Aĥmad Mamduhi estas tre aktiva pri en la  organizado de instruado de Esperanto en universitatoj. bonvolu rigardi ĉi tiun liston:

https://uea.org/vikio/Listo_de_universitataj_instruistoj_kaj_esploristoj,_kiuj_konas_Esperanton

kaj se vi konas iun, kiu ne estas en ĝi, bonvolu informi Aĥmadon aŭ min.

Renato Corsetti

# HEF kongresos en Seviljo

En oktobro  2023 okazos en Seviljo la 81-a Hispana Esperanto-Kongreso. La unuan tagon oni spertos sciencajn prelegojn, atelierojn kaj similaĵojn en la Universitato de Seviljo.Kelkaj profesoroj decidis eklerni nian lingvon kaj Esperante prelegi tiun tagon rilate al siaj fakoj. Tiuj kuraĝaj komencantoj estos akompanataj de hispanaj profesoroj, kiuj jam komforte prelegas Esperante. Tio okazos ĉeeste. Tamen mi

planas montri en mia universitato, ke Esperanto universitate viglas. Do mi petas vin pripensu partopreni eĉ neĉeeste. Universitatano estas homo, kiu ne havas tempon aŭ kutime plendas pri tio. Tamen, eble vi trovos manieron atingi momenton la 11-an de oktobro kaj virtuale prelegi aŭ prelegeti pri via fako. Antaŭpretigita video bonvenas. Bonvole ne hezitu kontakti min por la celo kunpensi pri,  kiel vi povas, plej komforte kunlabori por tia videbligo de nia lingvo en universitato.

Viko,Valeencia. Esperanta entrepreno por la demokratiigo de la scienco
Universidad de Sevilla (Hispanujo), Université de l'Espoir (DR Kongo)

# Nova LA en Afriko preta por peti aliĝon

La 2-a de aprilo 2023 estis grava tago en la Afrika  Movado! Ni finfine  starigis la landan asocion de UEA en Respubliko de Kongolando-Brazavilo. Antaŭe ĝi ne ekzistis en tiu lando. Ĉeestis kiel honora gasto la vicprezidanto de GEA Andreas Emmerich, kiu pasigis tutan semajnon en Brazavilo..

Dum la stariga ceremonio ni parolis pri la historio de la lingvo Esperanto kaj ĝiaj avantaĝoj. Kaj due, mi klarigis la gramatikon kun aliaj temoj.Mi kaptis ankaŭ la okazon paroli kun du virinoj pri EVAA kaj ili konsentis pri Esperanto Virina Asocio. Nun tiuj du virinoj sekvas la Eo-kursojn ĉe Françoise Noireau (mia kunlaborantino). Mia ĝojo estas ke tiu revo realiĝis. La nova Landa Asocio nomiĝas KEsA-Bo kiu signifas farelmalonga@gmail.com: Kongolanda Esperanto-Asocio de Brazavilo




**Estraranoj:**

1) Prezidanto Malonga Delvy Farel Sylvester Prenomo: Farel , Retpoŝtadreso farelmalonga@gmail.com, Vacapo:+242066416555
2) Vicprezidanto: Charly Mukonzi, Retpoŝtadreso:Charlymokonzikabita@gmail.com
3) Sekretario: Kamenga Moïse

Vidu la du Kongoj situas najbare, iliaj ĉefurboj tute proksimas, laŭ la bordo de rivero.

Sendis:  Omba Tsamena.

# *La Merkato*, revuo de IKEF

Jen la enhavo de *La Merkato,* numero 102:

- Vortoj al la legantoj (John Huang)  p.3
- Pri IKEF (Chimedtseren Enkhee) p.3
- Nova kontribuo por nova epoko (Longarko Zhang ) p.4
- Norda vinfarado: Kiel la metia vinindustrio de Nov-Skotio  revigligas kamparajn regionojn? (Claudia De Fuentes)  p 6
- Ĉampano, la plej fama vino (Paul Quevy Lefevre) p. 11
- Vendu Sperton, Ne Produkton: Lecionoj Lernataj el Malgranda Vinferejo en Usono (Kejt Porter) p.14

- • Konatiĝu kun Nepalo (Poshraj Subedi)   p1 7
- Esperplena loko, Hajnano! (Longarko Zhang ).p. .21
- Prezentas la mondon de Wix: Wix-Partnero (2) (Yas Kawamura) p.24
- Pri laborperejo.com (Jan Michalak. p.28

IKEF alvokas vian kontribuon eĉ mallongan afiŝon de komerca ideo por venontaj numeroj de Merkato, celante ke ĝi estas informoplena kaj longdaŭra..

**SMG:** Certe bonvenos kontribuoj de ne-membroj de IKEF.

Mi proponas al IKEF-anoj instaligi la komunikilon Voĉato (http://www.wechat.com), ĉar kadre de Voĉato jam ekzistas multaj IKEF-grupoj por landaj filioj de IKEF, kaj IKEF-grupoj pri komerco kaj turismo, celante ke ni IKEF-anoj kune konstruu mondan apliksistemon de Esperanto kadre de IKEF.

# Brazila bukedo

Ĉi-semajne ni publikigis en **Brazila Kolekto** la **200-an** muzikvideon! Temas pri registraĵo farita kun la minasa kantistino **Paola Giannini**, de la kanto *Pro via irislum'* (portugallingve *Pela luz dos olhos teus*), de **Vinicius de Moraes**. Kaj la kantistino parolas esperante! Krome, vidu la kanton *Malgraŭ ke estu mi* (originale *Mesmo que seja eu*), verkitan de **Roberto k Erasmo Carlos** kaj tradukitan de **Vitor Mendes**; kaj de **Dorival Caymmi** la kanton *Por sambadi mialande* (originale *O samba da minha terra*), laŭ traduko de **Querino Neto**. Rete: <brazilakolekte.com>

========= vortoj:  1225 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php  por 2023 (ĝis 20.).

Aliaj Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

Korektoj GK ene majo 2. ED majo 2. Korekta versio.